

Kanti gefratoj kune

Duobla KD kun 32 hebreaj kaj jidaj kantoj tradukitaj en Esperanton.

Kantas: Chantal kaj Tova Ben-Cvi

Redaktado kaj grafiko: A.Wandel © ELI 2011

Enkonduko al la teksto-brosuro
akompananta la unuan kasedon,
Israelo Kantas, 1982

Tiu ĉi kantareto naskiĝis kiel akompana teksto al la samnoma kasedo. Tamen, ĝi havas ankaŭ propran meriton. Ĝi arigas konatajn kaj ŝatatajn israelajn kantojn pri ĉiuj temoj kaj el ĉiuj epokoj: en la unua parto troviĝas kantoj pri ĉiutagaj kaj personaj temoj: amo, sopiro, ĝojo de l'vivo. Ili fontas el diversaj epokoj: ek de la tagoj de la renoviĝo de la hebrea lingvo ("Dum vespero aŭ mateno", de ni nacia poeto H. N. Bjalik) ĝis la plej nova "Haleluja" – gajninto de la Eŭrovizio konkurso en 1980.

La dua parto konsistas el amantoj de alia speco: amo de popolo al sia lando. Pluraj el ii estas ligitaj al nia longa historio de lukto por sendependeco kaj paco: "Finĝan" – de la lukto por sendependeco en la kvardekaj jaroj, "Jerusalemo de or" kiu preskaŭ fariĝis himno en 1967, ĝis "La mielo kaj pikilo" kiu ligiĝis al la paco kun Egiptio en 1982.

Esperable tiu eta kolekto fidele reperezentas la buntan israelan kanto-folkloron, kaj de la muzika vidpunkto, kaj de la Etnologia.

A. Wandel

Enkondulo de la nova KD

Tiu ĉi duobla albumo reprezentas longan vojon kiun mi persone kaj la Esperanto-movado en Israelo faris dum tri jardekoj, de post kiam mi eldonis la unuan israelan kasedon en Esperanto, *Israelo Kantas* en 1982. La tiama eldono estis farita duonamatore – mi kolektis 14 kantojn, tradukitajn ĉefe de *Josef Murjn* kaj *Josef Kohen-Cedek*, kaj pasigis multajn tagojn instruante la esperantajn tekstojn al la ĉarma festen-kantistino *Chantal* kiu havis belegan voĉon sed apenaŭ konis Esperanton. Aldone mi pretigis apartan kanto-libreton, akompanita per desegnaĵoj de s-anino *Jehudit Epštajn* kaj mi. Ĝin presis presejo "Multiprint" de esperanta familio Kleiner. Ĉar ELI taksis la eldonon finance tro riska, mi mem pagis por la kasedo-produkton kaj registris la kopirajtojn al JELI. La kasedo rapide elĉerpiĝis. Antaŭ la IJK en 1986 en Israelo la LKK reeldonis la kasedon.

En la jaro 1993 mi eldonis duan kasedon, *Israelo ne ĉesas kanti*. Mi plurfoje renkontiĝis kun J. Kohen-Cedek kaj kun J. Murjan por elekti la plej taŭgajn kantojn, kaj plurajn tradukis mem, entute 20 kantoj. Kiel kantistino estis elektit-anino Tova Ben-Cvi kaj la grafikon kaj tekstojn mi preparis komputile.

Post la UK en Tel Avivo, en 2001, mi eldonis la KD-on, *Bonvenu paco*, kun kelkaj kantoj de ambaŭ kasedoj. Ĝi rapide elĉerpiĝis, estis reeldonita kaj denove elĉerpiĝis. La nuna duobla KD enhavas ĉiujn 32 kantojn de ambaŭ kasedoj, ĉiujn tekstojn kaj tutnovan grafikon.

A. Wandel

Rakonto de Kanto al Paco: memore al Jichak Rabin

Antaŭ dek kvin jaroj, en la placo kiu hodiaŭ portas lian nomon, staris la chefministro Rabin sur la podio, fine de amasa subten-demonstracio, kaj kune kun la kantistino Miri Aloni, lia kolego Shimon Peres kaj aliaj, kantis el tajpita pagho la kanton kiu multe identigis kun la pac-procezo: Kanto al Paco. Kelkajn minutojn poste li estis mort-pafita, la pagho kun la teksto de la kanto, kiu ankoraŭ troviĝis en la posho de lia jako estis makulita per lia sango. Tri jarojn pli frue mi tradukis "Kanton al Paco" por la dua sonkasedo "Israelo ne ĉesas kanti" de hebreaj kaj jidaj kantoj en Esperanto, kantitaj de Tova Ben-Cvi. Ghi sekvis la unuan sonkasedon de israelaj kantoj en Esperanto, "Israelo Kantas" kiun mi produktis dek jarojn pli frue, kun la kantistino Chantal, kaj kiu elĉerpiĝis delonge. La fama kanto "Kanto al Paco" verkita de Jaakov Rotblit estis siatempe malpermesita por dissendo en la radio.

En la naudekaj jaroj ghi farighis unu el la simboloj de la maldekstra por-paca movado. Post la murdo de Rabin, ghi farighis ankau unu el la kantoj kantitaj je lia memoro, ĉiujare en la datreveno de la murdo. Nature, la kantistino Miri Aloni farighis plej identigita kun tiu kanto. Kelkajn jarojn poste shi prezentis kant-vesperon en mia loĝloko, kaj post la koncerto mi alparolis shin kaj proponis ke shi kantu la Kanton al Paco en Esperanto en unu el niaj Landaj Kunvenoj. Shi entuziasmighis kaj diris ke tio estos "la kanto de paco en la lingvo de paco", sed la afero ne realighis ĉar shia impresario enmiksigighis kaj postulis tre altan pagon por shia prezento. La rakonto daŭras en la jaro 2000, kiam okaze de la Universala Kongreso en Tel

Avivo ELI planis eldoni kompaktdiskon kun israelaj kantoj. La projekto efektiviĝis unu jaron poste. La KD-on kiu konsistis el 28 kantoj – la plejmulto de ambau sonkasedoj, mi nomis "Venu Paco" kaj la du kantoj che ĝhia komenco estas "Bonvenu Paco sur vin" kaj "Kanto al Paco". La lasta ĉapitro en tiu rakonto okazis en 2009, kiam dum la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo prezidento Peres vizitis la budojn. Kiam li preteriris la Esperanto-budon, mi demandis lin (ĉu li memoras ke li estis la alta protektanto de la UK en la jaro 2000. Li memoris, kaj tiam mi donacis al li la KD-n kaj rakontis la historion pri la Esperanto-traduko de la Kanto al Paco. Mi – kaj eble iomete ankaŭ li – emocie sentis ke fermiĝis cirklo.

La Esperanta traduko kun tiu rakonto aperis en la ĉi-jara kajero de la literatura bulteno "Shvilim" de la urbo Modiin.

Kanto al paco

Teksto: J.Rotblit Melodio: J. Rozenblum

Tradukis: Amri Wandel

Venu luma sun-radi', matena ilumin'
La plej pura perĝ' al Di' ne revivigos nin
Kies vivon tuŝis fin' kaj kuŝas en la ter'
Ne plorego vekos lin por viva efemer'
Person' ne revenigos nin el tomba la infer'
Utilos ja nek ĝojo de triumf' kaj venk'
Nek kantoj de liber'

Refreno: Do laŭte kantu, kanton al pac'
Ne flustru preĝon pri
Plenvoĉe laŭdu l'pacon sen lac'
Ne ĉesu via kri'.

Tra la floroj de l'tombej' penetru suna bril'
Eĉ falintoj karaj plej, ripozu en trankvil'
Kun espero la spirit' ne cedu al minac'
Kantu ne por la milit' sed por la am' kaj pac'
Ne diru "iam venos pac' ", alportu ĝin vi mem
Ne estas rev' kaj sonu do en ĉiu plac'
Jubil' kaj pac-poem'

Refreno

Kanti gefratoj kune

A: Kantas: Chantal, Akompano: Kalman Shtern
B: Kantas: Tova Ben-Cvi Akompano: Haim Cur
Redaktado kaj grafiko: A.Wandel © ELI 2011

A1. Ĝoju fratoj

הבה נגילה

Teksto/melodio: popola Trad. A.Wandel

Fratoj, ni ĝoju kune, ni ĝoju kune |
ni ĝoju kune per kant' | x2

Kantu ni plen-ĝoje, kantu ni plen-ĝoje, |
ĝoje kantu ni ankoraŭ foje | x2

Veku, veku fratoj:
Al ĝojo veku viaĝ koron
Al kantado veku ĥoron
Elĉerpigu ĝoj-trezoron
Ni ne ĉesu tutan horon
Kantu ĥor' kun fervor'
Kaj ĝojo en la kor'.

Hebree:

Hava, nagila hava, |
Nagila hava, nagila venismeha | x2
{Hava neranena }x3 venismeha | x2
Uru, uru ahim,
{uru ahim belev sameah } x5

B3. Kanto al paco

שיר לשלום

Teksto: J.Rotblit Melodio: J. Rozenblum
Trad. A.Wandel

Venu luma sun-radi', matena ilumin'
La plej pura pereĝ' al Di' ne revivigos nin
Kies vivon tuŝis fin' kaj kuŝas en la ter'
Ne plorego vekos lin por viva efemer'
Person' ne revenigos nin el tomba la infer'
Utilos ja nek ĝojo de triumf' kaj venk'
Nek kantoj de liber'

Refreno: Do laŭte kantu, kanton al pac'
Ne flustru preĝon pri
Plenvoĉe laŭdu l'pacon sen lac'
Ne ĉesu via kri'.

Tra la floroj de l'tombej' penetru suna bril'
Eĉ falintoj karaj plej, ripozu en trankvil'
Kun espero la spirit' ne cedu al minac'
Kantu ne por la milit' sed por la am' kaj pac'
Ne diru "iam venos pac'", alportu ĝin vi mem
Ne estas rev' kaj sonu do en ĉiu plac'
Jubil' kaj pac-poem'

Refreno

Bonvenu paco

Kantas: Tova Ben-Cvi kaj Chantal
Akompano: Haim Cur, Kalman Shtern
Redaktado kaj grafiko: A.Wandel © ELI 2001

1. Bonvenu paco sur vin הבאנו שלום עליכם

Teksto/melodio: popola Trad. J. Murjan

Bonvenu paco sur vin x3
Bonvenu paco, paco, paco sur vin

Hebree: hevenu ŝalom aleĥem x3
Hevenu ŝalom, ŝalom, ŝalom aleĥem

2. Ĝoju fratoj הבה נגילה

Teksto/melodio: popola Trad. A.Wandel

Fratoj, ni ĝoju kune, ni ĝoju kune |
ni ĝoju kune per kant' | x2

Kantu ni plen-ĝoje, kantu ni plen-ĝoje, |
ĝoje kantu ni ankoraŭ foje | x2

Veku, veku fratoj:
Al ĝojo veku vian koron
Al kantado veku ĥoron
Elĉerpigu ĝoj-trezoron
Ni ne ĉesu tutan ĥoron
Kantu ĥor' kun fervor'
Kaj ĝojo en la kor'.

Hebree: Hava, nagila hava, |
Nagila hava, nagila venismeha | x2
{Hava neranena }x3 venismeha | x2
Uru, uru aĥim, {uru aĥim belev sameaĥ } x5

3. Kanto al paco שיר לשלום

Teksto: J.Rotblit Melodio: J. Rozenblum
Trad. A.Wandel

Venu luma sun-radi', matena ilumin'
La plej pura pereĝ' al Di' ne revivigos nin
Kies vivon tuŝis fin' kaj kuŝas en la ter'
Ne plorego vekos lin por viva efemer'
Person' ne revenigos nin el tomba la infer'
Utilos ja nek ĝojo de triumf' kaj venk'
Nek kantoj de liber'

Refreno: Do laŭte kantu, kanton al pac'
Ne flustru preĝon pri
Plenvoĉe laŭdu l'pacon sen lac'
Ne ĉesu via kri'.

Tra la floroj de l'tombej' penetru suna bril'
Eĉ falintoj karaj plej, ripozu en trankvil'
Kun espero la spirit' ne cedu al minac'
Kantu ne por la milit' sed por la am' kaj pac'
Ne diru "iam venos pac'" , alportu ĝin vi mem
Ne estas rev' kaj sonu do en ĉiu plac'
Jubil' kaj pac-poem'

Refreno

4. Haleluja הללויה

Teksto: J.Goldhirsh Melodio: S.Fajkov
Trad. J. Kohen-Cedek , J. Murjan

Haleluja – al la mond'
Haleluja – ni kantu en rond'
Por la sola vort' dankas ni,
La koroj batas en uni'
Kiel belas kaj mirindas nia mond'

Refreno: Haleluja – per la kant’
Haleluja – pri tago lumant’
Haleluja – pri tuta paseo
Kaj bela futuro – haleluja!

Haleluja – al la mond’
Haleluja – ni kantu en rond’
Kaj aŭdiĝos laŭta sona eh’
Per ĉiu forta tintileg’
Ripetata ja kun ni: Haleluja !

Refreno

5. Parolu al mi per floroj דבר אלי בפרחים
Teksto: U. Asaf Melodio: D.Zelcer
Trad. J. Murjan

Ŝi diris, dum vintra pluvega vesper’
Ke blanka – jen ŝia ŝatata kolor’
Li tuj enmanigis al ŝi kun tener’
Narcisojn en fasko de ĉarma odor’

“Stultuleto”, ŝi diris kun rid’
“ni atendu ĝis venos april’”

Refreno: Prolu per floroj al mi, karulet’
Parolu per flor-buked’

Buntiĝis en sun’ primavera savan’
Ekesti printempa – jen ŝia dezir’
Li venis kun kron’ krizantema en man’
Sed ŝi jam sopiris al tag’ de somer’

“Ĉiujn florojn kolektu de l’ter’,
ĝis revid’ kiam pasos printemp’”

Refreno

Varmega somer’ – ĉio sekiĝis jam,
Ne restis sovaĝa eĉ lol’ sur la kamp’
Subite, ĉe li ŝi aperis kun pet’
Pri flor-tuf’, almenaŭ pri unu floret’.
Kion fari se regas la sek’ ?
Tamen ŝia ne ĉesis peteg’

Refreno

6. Tie ĉi כאן
Teksto/melodio: U.Ĥitman Trad. A.Wandel

En ĉi-hejma nesto jen naskiĝis mi
Sur l’ebeno ĉe la mara ond’
Kun ĉi amikaro maturiĝis mi
Ne havas mi alian en la mond’

En sin’ de ĉi montoj la junec-premi’
Min ĝojigis dum infana spert’
El montara fonto akvon trinkis mi
Arbojn plantis mi en la dezert’

Refreno: Ĉi – naskiĝis mi, ĉi – naskiĝis mia fil’
Hejmon konstruis mi per propra man’
Ĉi – estas ankaŭ vi kun ĉiu nia kamarad’
Kaj post jarmiloj du – finiĝis la vagad’

En ĉi gard-posteno mi atendis
Laŭte mia kanto sonis pri
Kara lando kiun mi defendis
Tiu ĉi amata la patri’

Hejme ĉi ĉe tablo kun regalo
Najbarojn bonvenigu paca man’
Ĉar jam troas sango kaj batalo
La gastojn ni salutu “Ahalan”

Refreno

<p>7. Ho kiel bone agrable הנה מה טוב</p> <p>Teksto/melodio: popola Trad. J. Murĵan</p> <p>Ho kiel bone, agrable, sidi gefratoj kune x2 Jen plezuro, kun geamikoj kune x2</p> <p><u>Hebree:</u> Hine ma tov uma naim Ševet aĥim gam jaĥad</p> <p>8. Lando de mia amo בארץ, אהבתי</p> <p>Teksto: L.Goldberg Melodio: M.Amariljo Trad. J. Murĵan</p> <p>En lando de mia am' migdalujo floras La landon de mia am' sorta gast' favoras Lin fianĉinoj sep kun vidvinoj en krep' Dum la ven-antend' deĵoras x2</p> <p>En lando de mia am' flirtas flag' sublime En landon de mia am' venas gast' pilgrime Dum benata hor' laŭ konvena mor' Gajos popol' anime x2</p> <p>Al kiu agla okul' tiu lin ekgvidos Al kiu saĝ-regul' je li ekkonfidos Kaj sen erar' por savo-far' Tra prodeg' lin engvidos</p> <p>En lando de mia am' migdalujo floras La landon de mia am' sorta gast' favoras</p>	<p>9. Tumbalajko טומבלליקה</p> <p>Teksto/ Melodio: popola Trad. J. Murĵan</p> <p>Pensas meditanta junul', Pensas li dum nokta nebul' Kiun elekti ne ofendante Kiun ekami ne hontigante</p> <p><u>Refreno:</u> Tumbala, tumbala, , tumbalalajko x2 Tumbalalajko, por tumbalalajko Tumbalalajko, ĝoju kun ni !</p> <p>Volu diveni, ho belulin' Kio kapablas bruli sen fin' ? Kio sen pluvo kreskadi povas? Kio sopiras, senlarne ploras ?</p> <p><u>Refreno</u></p> <p>Kia, stultulo, simpla enigm' Amo kapablas bruli sen fin' Ŝtono sen pluvo kreskadi povas Koro sopira sen larme ploras</p> <p><u>Refreno</u></p> <p>10. Mia kredo שחקי, שחקי</p> <p>Teksto: S.Tsherniĥovski Melodio: T.Shlonski Trad. J. Kohen-Cedek</p> <p>Moku, moku, ne rezignon de ĥimera utopi' Ĉar konfidas mi hom-dignon, fidas mi al via pi'</p> <p>Moku kredon pri realo, de l'am al parenca kor' Kun komuna idealo dum feliĉo kaj angor'</p> <p>Kredas mi ke l'estonteco portas pacon al la mond La nacioj en frateco vivos en amika rond'</p>
--	---

<p>11. Ho Di' הליכה לקיסריה</p> <p>Teksto: Ĥ. Senesh Melodio: D. Zehavi Trad. J. Murĵan</p> <p>Ho Di', Ho Di', Ke restu por ĉiam sen fin': La sablo la mar', susuro de l'akvo, Lumbrilo ĉiela, esper' de l'homar' Ho Di', Ho Di'...</p> <p>12. Ni ne ĉesos kanti אנחנו לא נפסיק לשיר</p> <p>Teksto: Ĥ.Ĥefer Melodio: D. Zelcer Trad. J. Murĵan</p> <p>Se de la kurs' nur restas gelemantoj du Kaj al kunven' ne venas veteranoj plu Se nia rond' maldensa iĝas pli kaj pli Ne ĉesos, ja ne ĉesos nia melodi'</p> <p><u>Refreno:</u> Ni ne ĉesos kanti x3 Ne, ne ĉesos kant'</p> <p>Se estas bru', skandaloj, eĥoj kaj ĥaos' Kaj la erar' pro ne tro ĝusta diagnoz' Se l'inflaci' galopas kiel kurĉeval' Ja daŭras plu kantanta nia festival'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p> <p>Ĝi estas ja la sola nia patrujet' Ni devas nin nur leberigi de l'obsed' Ĝis vivos ni disfloron de l'printempa land' Kaj tial do senĉese ehos nia kant'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p>	<p>13. Ne amis mi ĝis sat' עוד לא אהבתי די</p> <p>Teksto / Melodio: N.Shemer Trad. J. Kohen-Cedek</p> <p>Ankoraŭ mi ne fondis setlejon per man-lert' Put' mia ne elfontis en mez' de la dezert' Ankoraŭ mi levkojon ne pentris per efekt' Kaj iras mi la vojon sen sci de la direkt'</p> <p><u>Refreno:</u> Kia stat': ne amis mi ĝis sat' Nur vent' karesis min sur vanga glat' Kia stat': ne cedas mi al fat' Ĉar se ne nun do kiam venos la dat'</p> <p>Ankoraŭ ne konstruis sur monto urbon mi Ĝardenon mi malfruis plantadi por premi' Ne ĉion propramane mi faris por feliĉ' Nek multon spertis vane nek amis ĝis sufiĉ'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p> <p>Pro via bel' vin ame kun ŝat' evitas mi Dangeras vi pli flame ol eĉ epidemi' Jen malgraŭ forta hasto for-restis multa far' Pardonu pro prokrasto ĝis la venonta jar'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p>
---	--

<p>14. La Ruĝa Roko הסלע האדום</p> <p>Teksto: Ĥ.Ĥefer Melodio: J. Zahari Trad. A. Wandel</p> <p>Malantaŭ la dezert' kaj la montar' Fabel' rakontas ke troviĝas rok' Por multaj vivoj estis ĝi altar' Kaj estas ĝia nomo Ruĝa Rok'</p> <p><u>Refreno</u>: Ho, fabela Ruĝa Rok', Ruĝa Rok'</p> <p>Triope ili ekis je vesper' Varmegis la dezerto ĝis sufok' Akvujo, map' kaj olda rev-esper' Al celo de l' fabela Ruĝa Rok'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p> <p>Unua navigadis ĉiĉeron' Rigardas li la stelojn de l'ĉiel' Migradas tra rokaro kaj kanjon' Aspiras al la ruĝa citadel'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p> <p>Mallonge tondris pafoj kiel ŝtorm' "Vundiĝis mi" ĝem-flustris raŭka vok' Respondis kvazaŭ el profunda dorm' l'amikoj: "venis ni al Ruĝa Rok'"</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p>	<p>15. Mallarĝa ponto גשר צר מאוד</p> <p>Teksto / Melodio: popola Trad. J. Murĵan</p> <p>Estas la tuta mond' – {tre mallarĝa pont'} x3</p> <p>Kaj precipe, precipe do, ne timiĝi, ne timiĝi tute Kaj precipe, precipe do, ne timiĝi, ne timiĝi, ne!</p> <p>16. Melodioj ניגונים</p> <p>Teksto: F. Bergshtein Melodio: D. Zehavi Trad. J. Giladi, J. Murĵan</p> <p>Melodiojn vi plantis en koro ĉe mi Ho gepatroj, per digno, per am' Tiu grajno ekĝermis, ekkreskis en ĝi La sonoj, la tonoj, la gam'</p> <p>Dum ĉiu tagnokt' pulsadas ili kun la sang' Radikitaj en vejnoj, en kor' Zumas ili en mi, ripetadas ilin mia lang' Restas ade en mia memor'</p> <p>Ekaŭdiĝas jen mia antikva lulkant' El buŝo de panjo al fil' Tradiciaj motivoj de l'sankta sabat' Briletas tra larmoj kaj rid'</p> <p>Se voĉ' via zumas en orel' al mi Mutas ĉiu sonor' kaj susur' La okulojn fermante, jen estas sole mi kun vi Super tiu abisma obskur'</p>
--	--

17. Ĉe la vojo על הדרך

Teksto: I. Manger Melodio: popola
Trad. J. Kohen-Cedek

Ĉe la vojo staras mirt', arbo kliniĝinta
De la arbo ĉiu bird' estas forfluginta
Flugis al la orient', al la varmo suda
Lasis arbon je la vent', stari vintre nuda

“Panjo” diris mi kun pet' “lasu min ekesti
lert-flugila kant-birdet', sur la arbo nesti”
sidos mi sur banĉ' de l'plant' dum la longa vintro
lulos ĝin per dolĉa kant', ne malhelpu min tro...”
Ho tari tari ...

Diris ŝi kun plora larm' “Di' cin gardu' filo
Ke ne estu la malvarm' por san' malutilo”
“Panjo ĉesu l'plora kri', sek-okula restu
antaŭ la kalkul' ĝis tri mi jam birdo estu”

Panjo petis pri bon-ag': ŝalon sur-kolumi
“Dio gardu cin de plag' por ne malvarmumi
La galoŝojn prenu kun, timu vintrajn frostojn
Sen la pelt' la vento nun enpenetras ostojn”
Ho tari tari ...

“Jen trikita la ĉemiz': vestu ĝin, etulo
ĉar sen ĝi en paradiz' gastos vi stultulo”
La flugil' ne levis min pro l'vest malkomforta
Tro volvita de l'patrin' la birdet' sen forta

Trista estis la akklam' varmajn vestojn vesti
Birdo min patrina am' ne allasis esti
Ĉe la vojo staras mirt', arbo kliniĝinta
De la arbo ĉiu bird' estas forfluginta.

18. Dana Dana דונה דונה

Teksto: A.Tsajtlin Melodio: S. Sekunda
Trad. J. Murĵan

Sur furgono al foiro ĝeme ploras bovidet'
Supre flugas kun zefiro kvivitanta kant-birdet'

Refreno: Ventoj hurlas, ridas, mokas kun fier'
Tage kaj vespere eĉ, tra tuta la somer'
Dana, Dana...

Ĉesu ĝemi, larmoj vanas, ĉar naskiĝis vi bovid'
Sen flugilan birdon ĉenas, ade nur dumviva brid'

Refreno
La bovidoj sen espero iras vice al la buĉej'
Sed ja ĉiuj al libero kiel bird' sopiras plej

Refreno

19. Maristo ĉe botel' קול אורלוגין

Teksto: J. Menusi Melodio: J. Zarai
Trad. J. Kohen-Cedek

Sonis horloĝ' pri nokta mez'
Brulas taverna lum-kandel'
Maro tempestas, hurlas briza frenez'
Nur mi maldormas ĉe botel'

El mar-lontano blovas ŝtorm'
Flagras ŝip-lum' tra nokt-malhel'
Dum la deĵor' stiriston venkis la dorm'
Nur mi maldormas ĉe botel'

Ĝis la ferdek' tempestas ond'
Krevis la masto, falis vel'
Sinkis la ŝipo grunden ĝis pint' de l'sond'
Nur mi maldormas ĉe botel'

20. Promenas la nokto הלילה עובר בשדרה

Teksto/Melodio: N.Shemer
Trad. J.Kohen-Cedek

L'aŭtuna alven' al vinbera ĝarden'
rikoltis en fruktaj valoj - sed unu ber-branĉ
saviĝis de tranĉ' – profite por la ŝakaloj

Refreno: Jam leviĝis el mar' la nebul' kun amar'
Kaj promenas la nokt' en bulvard'
Dum leviĝis el mar' la nebul' kun amar'
Promenadas la nokto dum trad'

En fora insul' fiŝist' pro nebul'
Alflosis sur ond-torento
Sed unu ŝipet' perdiĝis kun ret' –
Ofero de ŝtorma vento

Refreno

Dum nokta silent' revenis taĉment'
Tendaron sen lev' de flago
Sed unu trupan' sur voj' en lontan'
Perdiĝis trans mont' dum vago

Refreno

Dum mia voj-sort' febliĝis la fort'
Kaj mia kanzon' akuta
Nur kant' de sopir' forestis en lir'
Sed estas por ĉiam muta

Jam leviĝis el mar' la nebul kun amar'
Kaj promenas la nokt' en bulvard'
Kaj nur kant' de angor' resonadas en kor'
Kiam nokt' promenadas dum trad'

21. Vagabonda kanto שיר הנודד

Teksto : A. Ashman
Melodio: M. Zeira
Trad. J.Kohen-Cedek , A. Wandel

La vojo estas longa al la cel', la cel'
La vojo estas longa laŭ destin' de l'sort'
Marŝadas oni en natura bel', en bel'
Marŝadas oni en natura bel' sen vort'

Nur sole mi, nur sole mi, kun kant' de vagabond'
Helelu, haleluja halelu...
Petole mi, petole mi, promenas trans la mond'
Helelu, haleluja halelu...

La vojon kovris nigro de vesper', vesper'
La vojon kovris nigro de vesper-mantel'
Lumigas mian vojon la esper', esper'
Lumigas mian vojon la espera stel'

Kantadu mi, kantadu mi, eterna vagabond'
Helelu, haleluja halelu...
Vagadu mi, vagadu mi, kun kanto tra la mond'
Helelu, haleluja halelu...

Deziras mi nek domon nek kaban', kaban'
Deziras mi nek domon nek ĝarden ĉe l'voj'
Kompencas min nur via akompan', kompan'
Kompencas min nur via akompan' kaj ĝoj'

Do kantu mi kaj laŭdos Di' sed eĥos via ĥor'
Helelu, haleluja halelu...
Ĉar vanas vers' kaj melodi' se mankas eĥ' en kor'
Helelu, haleluja halelu...

22. Ne gravas kamard' לא נורא חבר

Teksto : J.Tehar-Lev
Melodio: M. Vilenski
Trad. A. Wandel

Amikoj du laŭ voj' promenis bim bam bom
Vundiĝis unu ĉar tro penis bim bam bom
Ĉar la vund' lin tre ĉagrenis bim bam bom
Pro dolor' li laŭte ĝemis bim bam bom

Refreno: Ne gravas kamarad' for la melankoli'
Ekzistas batoj gravaj pli !

Longe daŭris la vojaĝo bim bam bom
Elĉerpiĝis la kuraĝo bim bam bom
Sidiĝis ili ĉe vilaĝo bim bam bom
En bovina malpuraĵo bim bam bom

Refreno

Junulino el balkono bim bam bom
Ĵetis kiel am-propono bim bam bom
Florbukedon kiel krono bim bam bom
Kune kun florpot' el ŝtono bim bam bom

Refreno

Kiam do la du vagante bim bam bom
Al fin' de l'vojo promenante bim bam bom
Alvenos tamen esperante bim bam bom
Rekomenci ĝin kantante bim bam bom

Refreno

23. Dum vespero aŭ mateno לא ביום ולא בלילה

Teksto : Ĥ.N.Bjalik Melodio: popola
Trad. J.Kohen-Cedek

Dum vespero aŭ mateno, mi eliros al promeno
Sub la mont' en val' arbara staras akaci' multjara
Sorĉaŭguras ĝi pri l'sorto,
Pri estonta viv' aŭ morto
Mi divenos laŭ florbranĉo, kia estos la fianĉo?

Li el kiu venos lando: el poluj aŭ litva rando?
Ĉu en ĉar' kun multa bono,
aŭ kun sak' kaj vag-bastono?
Kia estos dot-trezoro, perloj aŭ koral' en oro?
Blonda li aŭ brun-vizaĝa, estos vidvo aŭ junaĝa?

Se li grizharulo estas, mi pri l'geedziĝ' kontestas
Petos patron: min mortigu, nur al li ne edzinigu
Ĉar ne volas mi oldulon, nur junulon, nur junulon

24. Venu panjo בואי אמא

Teksto: Lea Naor Melodio: Joni Richter
Trad. J. Murĵan

Jam la tuta lumo iris for, ne foriru ankaŭ vi
Venu panjo, venu panjo, venu, sidu plu kun mi
Batas arbojn vento forta, varman mann havas vi
Sidu panjo kaj rakontu: kiel venas song' al ni

Se anĝel' subite venos kaj aperos apud mi
Venu panjo, venu panjo, lin ekvidos ankaŭ vi
Ne, mallumon mi ne timas, mi ne tremas tute ja...
Venu panjo, ne forlasu min
Ĝis mi estos granda jam

<p>25. Finĝan פינג'אן Teksto: H.Hefner Melodio: popola Trad. J.Kohen-Cedek</p> <p>Blovetas facila la vent', Brul-knaras lignar de taĉment' La flamoj en fajra kankan' Leviĝas kun fum-timian' Kantante mi sidas, la kafon dividas: Rondiru, rondiru finĝan !</p> <p>Al karb' jetu mi kun aklam' Branĉeton – la nutron de flam' Ĝi brulu kun klaka rikan' Al nia kantad' akompan' La flamo jen fumas, branĉetojn konsumas Rondiru, rondiru finĝan !</p> <p>Jen bolas en lada karaf' Trinkaĵo de reĝoj – la kaf' Aldonas al ĝi kapitan'sukeron kun akv'el Jordan' Kelkfoje ĝi bolu, ni kantu petolu, Rondiru, rondiru finĝan !</p> <p>Trifoje jam ŝaumis la kaf' En pret' de elvers' kiel laf' Leviĝu tasetoj je san', de ĉiu bravul-partizan La kafo vaporas, bonguste odoras Rondiru, rondiru finĝan !</p> <p>Po iom kaf-guton post gut' Ni trinkas la tasojn per glut' Kaj jen fanfaronas rotan' pri sia milita roman' Pri luktoj, konkero (jurante pri l'vero) Rondiru, rondiru finĝan !</p>	<p>Omaĝas ni dum la trinkad' La falon de rot-kamarad' Dum marŝo de la karavan' Faliĝis lin paf-uragan' Kun larm' en okuloj funebras bravuloj Rondiru, rondiru finĝan !</p> <p>Forpasas la jaroj post jar' riveroj plu fluas al mar' Neniam komprenos fremdul' korprenon de nia bravul' do kantu kun sento la tuta taĉmento: Rondiru, rondiru finĝan !</p> <p>26. Lando, Lando ארץ, ארץ Teksto: J.Goldhirsh Melodio: S.Fajkov Trad. J. Murĵan</p> <p>Lando, nia lando, lando Israel' Ĝia suno – lakto kaj miel' Nia naskiĝlando – sole tie ĉi Por eterne restos la patri'</p> <p><u>Refreno</u>: Land', ni amas vin, Vi – patro kaj patrin' Lando de l'popol', paca kre-simbol' Nia naskiĝlando, sole tie ĉi eterne vivos ni.</p> <p>Lando, nia lando, strando ĉer la mar' Svarmo de infanoj kaj florar' Norde – la Kineret, sabloj en la sud' Ĉie sonas la "ŝalom" salut'</p> <p><u>Refreno</u></p>
--	---

<p>27. Jerusalemo de or' ירושלים של זהב</p> <p>Teksto/Melodio: N.Shemer Trad. J. Murĵan</p> <p>Vinece klara mont-aero kaj pina bon-odor' Ŝvebadas en la vent' vespera kun sonoril' sonor' En dorm' de arboj kaj ŝtonaro Songanta kaŝas sin La urbo kiu sola staras kun mur' en sia sin'</p> <p><u>Refreno:</u> Jerusalemo' de vera or' De kupro kaj de luma kron' Por ĉiu kant' via estas mi violon'</p> <p>Malplena restas plac' merkata, sekigis puta font' En urb' antikva vizitata ne estas templa mont' Kaj hurlas ventoj kun malĝojo En grotoj de l'rokar' Neniu laŭ Jeriĥo-vojo al Sala iras mar'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p> <p>Sed ornamente vin hodiaŭ per kron' kaj poemet' Mi estas fil' plej eta via, lastvica plej poet' Ĉar brogas lipojn via nomo Kiel kiso de Seraf' De l'ora urb' Jerusalemo, ne forgesita rav'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p> <p>Al viaj ni revenis fontoj, al la foira zon' Jen eĥas ĉe la Templo Monto la sankta korna son Sunmiloj brilas jam kun ĝojo En grotoj de l'rokar' Ni ree laŭ Jeriĥo-vojo al Sala iros mar'</p> <p style="text-align: right;"><u>Refreno</u></p>	<p>28. Luno, Lumas לילה לילה</p> <p>Teksto: N. Alterman Melodio: M.Zeira Trad. J. Meiri</p> <p>Luno lumas, la vento trakuras Luno lumas, folioj susuras Luno lumas kaj brilas jam stel' Dormu kanbino forbrulis kandel'</p> <p>Dormu dormu, forbrulis kandel' Luno lumas, Dormu kanbino forbrulis kandel'</p> <p>Luno lumas, mallevu palpebrojn Luno lumas, tenante la sabrojn Luno lumas, galopis al vi Dormu kanbino kavaliroj la tri</p> <p>Dormu dormu...</p> <p>Luno lumas, l'unua pafmortis Luno lumas, la dua neĝfrostis Luno lumas, la tria pro vin' Dormu kanbino forgesis li vin</p> <p>Dormu dormu...</p> <p>Luno lumas, blovegas la vento Luno lumas, ne estas silento Luno lumas, ne revu pri ĝoj' Dormu kanbino malplenas la voj'</p> <p>Dormu dormu...</p>
---	--